FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. N° 4

--- Julio 1968 ---

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Redaktas: S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27 - LES ANDELYS

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 15-a de marto, 15-a de junio, 15-a de septembro kaj 15-a de decembro.

==================================================================

ENHAVO:

Paĝoj: 1: Pioniro nin forlasis
2: Vivo de la grupoj
Kio vidinda en Norvegujo?
3: Nia 60-a nacia kongreso
4: Paĝo de la infanoj
Kotiztabelo

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## PIONIRO NIN FORLASIS.

La normandaj esperantistoj funebras, ĉar ili perdis unu el la plej agemaj pioniroj: S-ron Georges SAGET, 86-jaran.

Ni povus skribi longajn detalojn pri la vivo de tiu kuraĝplena batalanto, kiu senlace propagandis nian lingvon en la praktikaj fakoj kaj precipe en filatelo. Li pacience starigis plenan kolekton de ĉiuj poŝtmarkoj en Esperanto kaj tiel estis tutmonde konata.

La aĝo trafis lin nur fizike: ĝis la fino la spirito sin turnis al tiu idealo, kiun li ŝatis: Esperanton por unuiĝo kaj paco inter la popoloj.

M. BOSC.

N.D.L.R. S-ro SAGET mortis en Elbeuf la 1-an de majo.

&+&+&+&

## VIVO DE LA GRUPOJ.

**CLEON.** Pro la malfacilaj cirkonstancoj, la antaùplanita filmvespero ne povis okazi.

**LES ANDELYS.** Du ekzamensesioj okazis, la 16-an de majo por la infanoj: 7 knabinoj sukcesis en Atesto pri Lernado, 1 en Atesto pri Supera Lernado.
La 20-an de junio por la plenkreskuloj: 4 gesinjoroj sukcesis en Atesto pri Lernado.
La planita kermeso ne povis okazi pro la ĝenerala striko; se ne alvenos alia malhelpaĵo, ĝi okazos la 22-an de septembro en la publika ĝardeno de la 14-a ĝis ĝa 19-a horo.
Unu junulo pasigis la Paskan ferion en Norvegujo kaj du junulinoj veturos al Madrid kun S-ino Vincent en aùgusto. Ĉiuj tri ricevis stipendion el la Zamenhofa Kulturcentro.

RIMARKO: informojn por la oktobra bulteno bonvolu sendi antaù la 15-a de septembro.

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

## KIO VIDINDA EN NORVEGUJO?

Multaj homoj ne konas la esperantan lingvon. Sed mi havas la feliĉon scipovi tiun lingvon dank' al kiu mi povis fari belan vojaĝon:dum la Paskaj ferioj, mi estis en Norvegujo ĉe la familio de Caspary. Mi havis bonan restadon kaj tuj simpatiis kun la najbaroj kaj samideanoj. Mi lernis skiadon. Mi ankaù vizitis multajn muzeojn: "Fram-muzeon", la Fram estis la ŝipo de Roald Amundsen; "Kon-Tiki", tiun floson, kie ses homoj vivis sur la Pacifiko, kaj la vikingan muzeon.

Mi vizitis la popolan muzeon de Norvegujo en Oslo kaj vidis la domojn de la tuta lando. Mi vidis la saltejon por la skiantoj kaj la disvastigan turon por televido.

La tagoj ne daùris longe, ĉar la familianoj Caspary faris, kion ili povis por min okupi. Sed la tempo iris kaj iris kaj baldaù merkredo alvenis; en la mateno mi aĉetis memoraĵojn kaj vizitis la urbodomon en Oslo. Vespere mi forveturis per la vagonaro; mi estis en Paris vendredon je la oka matene.

Mi dankas la familion de Caspary pro la restado kaj S-inon Vincent pro la aranĝo de tiu restado.

GRAFFIN Alano, 17-jara knabo el Les Andelys.

=!=!=!=!=!=

## NIA 60-a NACIA KONGRESO.

Vera, sincera esperantisto ne povas ne interesiĝi pri la historio de Esperanto, same kiel bona franco ne povas ignori la historion de sia lando. La 60-a franca kongreso, okazinta en Aix-en-Provence, dum la paskaj ferioj, eniris ambaù historiojn, kiel duobla mejloŝtono: ĝi estas la 60-a en la vico de niaj naciaj kongresoj kaj ĝi okazis en la 70-a jaro de la ekzisto de nia nacia asocio, fondita en 1898, la plej malnova landa asocio en la mondo.

La universitata urbo Aix bele ornamis sin per diverslandaj kaj verdstelaj flagoj por akcepti la 250 kongresanojn alvenintajn el la tuta lando kaj eĉ el eksterlando. Efektive, partoprenis 3 Nederlandanoj, 2 Germanoj, 1 Ĉeño, 1 Finnlandanino kaj 1 Monakano. Ĝojige estis vidi tutan aron da gejunuloj, eĉ infanojn parolantajn Esperanton.

Bonege akceptis nin la Aix-a urbestraro, abunde raportis kun fotoj la loka gazetaro, serioze laboris la gesamideanoj en la kunvenoj, gaje ili rendevuis ĉe la varietea vespero, vere elstara, kaj ĉe la zorge preparitaj ekskursoj, lundon posttagmeze al kastelo Lourmarin kaj abatejo de Senanque, mardon tuttage al Arles, Kamargo, Saintes-Maries-de-la-Mer kaj Aigues-Mortes. Pie preĝis la katolikoj dum la tutesperanta diservo aranĝita de sacerdoto Wannemakers el Nederlando, kaj la protestantoj en la templo en la paska dimanĉo.

Modela estis la tuta organizo, bonhumoraj niaj sindonemaj Aix-aj kaj Marseille-aj deĵorantoj. Tiun raporton mi povas fini nur per laùda kaj danka vortoj.

Ĝis la 61-a en Strasbourg!

S-ino J. Vincent.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

PAĜO DE LA INFANOJ. ETA ŜAFISTO ( daùrigo)

Nun, se vi renkontus Franciskon, vi tuj vidus, ke li estas eta ŝafisto. Li havas bastonon: hakita fraksena branĉo. Sed li pli ŝatas sian vipon. La ŝafoj iras pli rapide se oni donas al ili malgrandajn batojn sur la krurojn, kiam ili lantas laùlonge de la vojeto.

En sia poŝo, Francisko havas sian tranĉilon ligita per ĉeneto. Sur sia dorso, li portas sian malnovan dusakon el griza tolo. En tiu dusako li metas sian manĝon.

Nun, Francisko ne ofte lavas sin. Irante laù la rivereto, li apenaù banas sian vizaĝon per iom da freŝa akvo.

(daùrigota)

========================

KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie . . . . . . . . . . . . . . 2 F
Kasisto: S-ro E. Jouis p.ĉ.k. Rouen 283-40 E

U.F.E.(kun "Revue Française") . . . . . . . . . . . . . . . . . 20 F
U.E.A.(kun "Esperanto" kaj Jarlibro). . . . . . . . . . . . . . 35 F
Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto p.ĉ.k.Rouen 2348-06 Z

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx
Dépôt légal: 3ème trimestre 1968.

Polycopié par le Centre Culturel et d' Amitié Internationale Zamenhof
27-Les Andelys.

La gérante: Mme J. Vincent.